

& Alo Dino kaj la edzina ruzo:

< Rekante 15 el 29 aŭ 20 el 34 batoj por strofo, entute 928 aŭ 1088 paŝoj dum 10 aŭ 12 minutoj. Armenan fabelon poemigis Julio Baghy (Ĉielarko, Tenerife 1966). Baladigis Martin Strid (2016) per feroaj melodio kaj rekantaĵo de Vilmunda balado aŭ per tiuj de Petro sinjor' kaj Elinborg..>

(#Melodioj:

(# Vilmunds kvæði: <1,6:34> /fami sofa fami mire; rere dore mimi; miimimi fami fami faso; sofa fafamii redo;

(#Rekantaĵe: mimi fa mi re; rere dore mi; mimi mimi mi fa;so sofa fami fami reldo; mimi fa mi re e))
?

(# Harra Pætur og Elingborg: <1,6:29> /LaaLaLa LaMi SiSi La; LaLaTi doTi LaSo; TiTi TiTi TiTi dodo; doTi doTi LaSo;

(Rekantaĵo: Ti TiTi La SolFa Mi LaTi do do;Ti Ti TiTi Mi LaTi doTi La a))

)×32)+

(&Strofoj:

'1 "/Kara edzo, Alo Dino, ; kion vi preĝpetas?"
; "Ĉiutage, ho, edzino, ; mi de Dio petas,

(×: &Rekantaĵo:

(& Vilmunds kvæði: **Dancu mastrino ; belan elektas mi. ; Dancu min al mano ; ja bele kiel povas vi2. ; Dancu mastrino.**)

? (& Harra Pætur og Elingborg: **Nun emas mi e2n dancon jam iri ; dum rozoj, lilioj kreskadas tre.**))

ke Li donu pluvon, sunon, ; al la agrosulko, ;
for de hejmo tenu punon; estu lardo, bulko!"

(×: &Rekantaĵo)

'2 "Estus saĝe, Alo Dino, ; en la preĝon plekti:
; kontraŭ ruzo de l' edzino ; volu min protekti!"
..... Li priridis moke brue ; vortojn de l' edzino:
; "Peti tion superflue!" ; diris Alo Dino.

'3 Ŝin ofendis tiu rido,; eĉ diable tiklis ; kaj ŝercema venĝospito ; en ŝi tuj ekviglis. Do ŝi pensis: "Alo Dino, ; montris mi instrue, ; ĉu pri ruzo de l' edzino ; preĝi superflue?"

'4 Dum sur kampo Alo Dino ; pluglabore ŝvitis, ; ĉe vendisto la edzino ; belajn fiŝon vidis kaj el ili ŝi aĉetis ; je la propra plaĉo, ; sed *vivantaj* ilin metis ; al – tagmanĝa kaĉo.
.....

'5 Lin sub arbon kun afablo ; vokis ŝi invite ;
"Alo Dino, ĉe tuk-tablo ; manĝu apetite!"
Dum en ombro li tagmanĝis ; grasan kaĉon,
bulkon, ; fiŝojn ruze ŝi aranĝis ; en plugotan sulkon.

'6 Post foriro de l' edzino ; kaj post buŝoviŝoj ;
ree plugis Alo Dino ; ĝis trovo de l' fiŝoj...
Hej, sed kiam el sub tero ; vivaj fiŝoj venis, ;
mirfrapite pro l' apero ; tuj li duonsvenis.

'7 "Dio sankta! Jen miraklo! ; Brile ĝi atestas, ;
ke pro Dio eĉ en agro ; vivaj fiŝoj kreskas".
Hejmen portis la "miraklon" ; nia Alo Dino, ;
rakontinte la spektaklon; diris al l' edzino:

'8 "Se jam Dio fiŝojn donis, ; ilin mi profitu". ;
Lip-lekante li ordonis: ; "La "miraklon" fritu!
..... Ĉar mi volas eĉ festeni, ; estu fajna vino!" ;
Kapjesante lin kompreni ; montris la edzino.
.....

'9 Por tagmanĝo la edzino ; friton do plenumis,; sed ne manĝis Alo Dino: ; ĉion ŝi konsumis... Tre malsata Alo Dino ; vane nur atendis ; je frititaj fiŝoj, vino... ; Grumble li lamentis:

'10 "Nu, la fiŝoj, kie restis?" ; urĝis Alo Dino. ;
"Fiŝoj? Kiaj? Eĉ ne estis!" ; miris la edzino.
..... "Pro Diablo! Fiŝoj miaj, ; el sub ter' plugitaj". ; "Edzo kara, vortoj viaj ; ŝajnas stulte spritaj".

'11 "Stulte spritaj?" kriis Dino ; kaj bastonon prenis, ; sed je kriĉoj de l' edzino ; la najbaroj venis... .. "Helpu! Min li volas bati! ; Agas li saĝperde! ; Volu helpi, min kompati! ; Li frenezas certe".

'12 La najbaroj Alo Dinon ; lukte boksis, bridis, ; kiam bati la edzinon ; preta lin ekvidis. "Do, virino, al ni diru, ; kial li koleras?" ; "Lin demandu! Li mem diru, ; kial li kverelas?"

'13 "Mi ja diros, virinaĉo", ; por si pledis Dino. ; "Mankis ĉe tagmanĝa kaĉo ; fiŝoj miaj, vino!"

"Kiaj fiŝoj ili estis?" ; la demando flugis. ; "Kiaj en la agro kreskis, ; kiujn mi elplugis".

'14 Post respondo tuj konsente ; jesis ĉies kapo: ; "Nun ĉe Dino evidente ; rustas cerboklapo".

Liajn manojn kaj piedojn ; oni ŝnure ligis, ; neglektante sakrojn, petojn ; tuj lin rehejmigis.

'15 Ĉe kolono sur verando ; staris Alo Dino, ; kiam al li kun demando ; turnis sin l' edzino:

"Nu, ĉu saĝe, Alo Dino ; en la preĝon plekti: ; kontraŭ ruzo de l' edzino ; volu min protekti?!"

'16 Alo Dino klinis kapon, ; iĝis pia viro, ; ĵuris preĝi ĉiun tagon ; dece laŭ deziro

ĉar de tiu damna tago ; sciis Alo Dino: ; estas plej infera plago ; ruzo de l' edzino.)